

## CLAUZADEANA ROUX, NOVA LIKENGENRO

(*Clauzadeana* Roux, nouveau genre de lichen)

Claude ROUX \*

### RÉSUMÉ

Description d'un genre nouveau de lichen, *Clauzadeana* Roux, d'après l'holotype de *Lecidea instratula* Nyl.; ce lichen diffère notablement du genre *Lecidea* Ach. par :

- son amphithécium riche en cellules algales,
  - ses paraphyses richement ramifiées-anastomosées en réseau,
  - son tholus ascas du type *Lecanora* (I+ bleu à l'exception de la zone axiale I-),
- et n'appartient pas à la famille des *Lecideaceae*. *Clauzadeana instratula* (Nyl.) Roux, seule espèce connue du genre, est décrite :

Thalle : crustacé, aréolé, noirâtre, formé d'aréoles brun-rougeâtre, bordées de noir, planes, lisses, plus ou moins brillantes, J-, K-, C- et KC-. Médulle d'un brun noirâtre. Algue protococcoïde.

Apothécies : cryptolécatorines, 0,1-0,3(0,4 mm) de diamètre, enfoncées dans le thalle, noires, nombreuses, le plus souvent arrondies, rarement un peu allongées, à disque un peu concave ou plan, terne, et à rebord mince, non ou à peine saillant, mais bien visible car un peu blanchâtre.

Épithécium : vert émeraude ou vert sombre.

Hyménium : 50-60 µm de haut, incolore.

Subhyménium et hypothécium : non distincts l'un de l'autre, incolores.

Parathécium : incolore sauf au sommet (brun moyen).

Amphithécium : incolore mais riche en cellules algales.

Médulle sous-hypothéciale : brun noirâtre.

Paraphyses : très cohérentes, ramifiées-anastomosées en réseau, à cellules relativement larges et courtes.

Spores : (8-14 × 4-6 pm) incolores, par 8, simples, ellipsoïdales.

### RESUMO

Priskribo de nova likengenro, *Clauzadeana*, laŭ la holotipo de *Lecidea instratula* Nyl. Ĉi tiu likeno tre diferencas de la genro *Lecidea* pro :

- amfitecio algoriĉa,
- parafizaro rete kaj multe branca-anastomoza,
- askotoluso *Lecidea*-tipa (toluso J+ blua krom la akxa parto senreakcia), kaj ne apartenas al la familio *Lecideaceae*.

### ENKONDUKO

Okaze de likenologia esploro en Kantalo (Centra Montaro, Francio), HOUMEAU kaj mi (1981) trovis multajn *Lecidea*-speciojn, el kiuj pluraj ne determineblaj per la ekzistantaj libroj kaj publikaĵoj. Tial mi petis de la botanika muzeo en Helsinko (Finnio) plurajn tipojn de *Lecidea* por kompari ilin kun niaj specimenoj. La kuratoro (D-ro O. VITIKAINEN) afable sendis la tipojn sed neniu el ili identis kun la Kantalaj specimenoj. Tamen funda studo de la specimenoj el Helsinko donis valorajn rezultojn. Sendube la plej interesaj koncernas *Lecidea instratula* Nyl., pri kiu temas ĉi tiu artikolo, k *Lecidea chalybeoides* Nyl., pritraktita en alia publikaĵo (CLAUZADE k ROUX, 1984).

---

\* C.N.R.S., Laboratoire de botanique et écologie méditerranéenne, Faculté des sciences et techniques de Saint-Jérôme, rue Henri Poincaré, 13397 Marseille cedex 13.




Fig. 1. — Transversa sekcaĵo de apotecio (duonskeme; punktitaĵo: subhimenio kaj hipotecio; rondoj: algoĉeloj de la amfitecio kaj de la talo; nigraĵo: talmedolo).  
 Coupe transversale d'une apothécie (semi-schématique; en pointillé: subhyménium et hypothécium; ronds: cellules algales de l'amphithécium et du thalle; en noir: médulle du thalle).




Fig. 2. — Asko 8-spora kaj askosupro J+ (blua) krom la akso parto senreakcia.  
 Asque avec 8 spores et sommet ascal I+ (bleu) sauf la partie axiale non réactive.




Fig. 3. — Strukturo de la himenio (laŭ peceto da himenio kolorigita per kotonbluo en fenola laktato; la punktitaĵo estas askoj kaj askodonaj hifoj).  
 Structure de l'hyménium (d'après un fragment d'hyménium coloré par du bleu coton dans du lactophénol; les parties pointillées sont les asques et hyphes ascogènes).

Mikroskopa ekzameno de apotecio montras, ke «*Lecidea*» *instratula* ne apartenas al la genro *Lecidea*, pro amfitecio algoriĉa, parafizaro multe k rete branĉa-anastomoza kaj askotoluso *Lecanora*-tipa. Esploro en la likenologia literaturo evidentigas, ke oni neniam atribuis al ĝi ĝustan genron, ke neniu el la ĝis nun priskribitaj genroj taŭgas por tiu specio. Tial ŝajnas necese krei novan genron, kiun kun granda plezuro mi dediĉas al mia amiko Georgo CLAUZADE, eminenta likenologo.

#### DIAGNOZO: *CLAUZADEANA ROUX* GEN. NOV.

La ĉi-suba diagnozo baziĝas sur studo de la holotipo konservata en la botanika muzeo de Helsinko (H) en Finnio: Herbario de NYLANDER, n-ro 15 329 b («*Sur des rochers à la Bourboule, Mont-Dore. Legit. LAMY*», n-ro 1269).

*Thallus crustaceus, hypothallo et medulla nigricantibus instructus. Apothecia cryptolecanorina. Paraphyses arcte cohaerentes, ramoso-connexae anastomosantesque, cellulis sat exiguis brevibusque. Asci tholo I+ (caeruleo) instructi axiali parte excepta. Sporae octonae, sine colore, non halonatae, simplices.*

Talo krusteca, kun hipotalo k medolo nigretaj. Apotecioj aspiciliecaj. Parafizoj tre intergluaj, rete branĉaj-anastomoza, kun ĉeloj relative mallongaj kaj dikaj. Askoj kun toluso J+ (blua) escepte de la akso parto. Sporoj 8-opaj, senkoloraj, senhaloaj, senseptaj.

*Typus generis / Genra tipo: Clauzadeana instratula* (Nyl.) Roux n.c. (Baz. *Lecidea instratula* Nyl., *Flora*, 61: 242 (1878).

#### PRISKRIBO (FIG. 1-3)

**Talo:** (nur peceto 3 cm<sup>2</sup>) nigreta, areola; areoloj (0,2-0,8 mm) angulaj, ruĝete brunaj, cirkaŭitaj de nigra hipotala randaĵo, ebensupraĵaj, glataj, pli-malpli brilaj, J-, K-, C-, KC-. Medolo nigrete bruna. Algo protokokoida.

**Apotecioj:** aspiciliecaj (=kriptolekanorecaj), 0,1-0,3(0,4) mm, daŭre entalaj (kiel ĉe *Lecidea athroocarpa* Ach.), nigraj, multaj, po 1-2 en la areoloj (okupantaj ilian tutan larĝon aŭ lokiĝintaj ĉe ilia rando, plejmulte rondaj, kelkaj iom longformaj aŭ 2-ope kuniĝintaj, kun disko konkaveta aŭ ebena, malbrila sed ne aŭ apenaŭ (x 40) malglata, kaj randaĵo maldika, ne aŭ apenaŭ elstara, sed sufiĉe videbla ĉar iom blanketa.

**Epitecio:** malhele aŭ bele (smeralde) verda.

**Himenio:** 50-60 pm alta, senkolora.

**Subhimenio kaj hipotecio:** ne interdistingeblaj, senkoloraj, senkristalaj.

**Paratecio:** senkolora krom la supro mezbruna.

**Amfitecio:** senkolora, sed riĉa je verdaj algoĉeloj (algo protokokoida), krom la supro mezbruna.

**Subhipotecia medolo:** nigrete bruna.

**Parafizaro:** tre kohera, rete k multe branĉa-anastomoza.

**Parafizoj:** kun ĉeloj relative dikaj k mallongaj.

**Askoj:** 30-40 × 15 μm, kun dika toluso J+ (blua) krom la akso parto J-.

**Sporoj:** 8-14 × 4-6 μm, 8-opaj, senkoloraj, senseptaj, elipsoidaj.

**Piknikioj kaj piknidiosporoj:** ne viditaj.

**Kreskejo:** sur nekalka petro ĉe La Bourboule, Mont-Dore, Centra Montaro, Francio.

**Rimarko:** Ankaŭ INOUE (1983: 34) priskribas *Lecidea instratula* Nyl., el Japanio, sed mencias nek la specialan askotolusan strukturon nek al la algoriĉan amfitecion, kvankam ankaŭ li studis la holotipon: li eble pretervidis la algoĉelojn senkoloriĝintajn pro jarcenta konservado en herbario. Tial la identeco de la Japaniaj specimenoj kun *Clauzadeana instratula* estas necerta.

#### AFINECOJ

Estas evidente, ke «*Lecidea*» *instratula* apartenas nek al la genro *Lecidea* nek al familio *Lecideaceae* pro:

- apotecioj aspiciliecaj,
- aska toluso *Lecanora*-tipa (J+ blua krom la akso parto J-),
- parafizaro rete k multe branĉa-anastomoza.

Ankaŭ *Mosigia* (kun la sola specio *M. gibbosa* (Ach.) Körb.) laŭ POELT k VĚZDA (1977) havas askotuluson J+ (bluan) k parafizaron branĉan-anastomozan. Tial mi hipotezis, ke *Lecidea instratula* Nyl. apartenas al tiu genro. Tiucele mi petis de la botanika muzeo en Munkeno (Germanio) specimenojn de *Mosigia gibbosa*, kiujn afable sendis H. HERTEL. Evidentigis, ke la aska strukturo de *Mosigia gibbosa* tre malsimilas al tiu de *Lecidea instratula* Nyl. (fig. 4); krome la parafizoj de *Mosigia* estas ne nur multe malpli riĉaj je anastomozoj k branĉoj sed ankaŭ distingeble malpli dikaj ol tiuj de *Clauzadeana*; fine, la hipotecio de *Mosigia* estas nigra (senkolora ce *Clauzadeana*). Ĉio tio konvinkis min pri la neceso krei novan genron. Fakte la parafizaro de *Clauzadeana* aspektas kiel tiu de la *Opegraphaceae* (*Opegrapha*, *Lithographa*). Sed ĉe tiuj ĉi likenoj la askofruktoj estas neniam aspiciliecaj (sed ĝenerale lireloformaj) kaj ĉiam ĉirkaŭitaj de karbonigra eksciplo (tute malesta ce *Clauzadeana*).

Laŭ HAFELNER (*in litteris*) *Clauzadeana* pro askostrukturo devas aparteni al la familio *Lecanoraceae*, kie ĝi okupas apartan lokon pro apotecioj aspiciliecaj kaj parafizaro multe kaj rete branĉa-anastomoza.

## BIBLIOGRAFIO

- CLAUZADE G. k ROUX C., 1984. — *Pseudolecidea* Clauz. et Roux, nova likengenro. *Bull. Soc. Linn. Provence*, **35** (presata).
- HOUMEAU J.M. k ROUX C., 1981. — Lichens et groupements lichéniques observés lors de la 7<sup>e</sup> session extraordinaire de la S.B.C.O. dans le Cantal. *Bull. Soc. bot. Centre-Ouest*, nov. ser., **11**: 87-103.
- INOUE M., 1983. — *Lecidea*, *Lecidella* and *Huilia* in Japan. I. *Lecidea*. *Journ. sci. Hiroshima Univ.* (ser. B, div. 2), **18**: 1-55.
- POELT J. k VĚZDA 1977. — *Bestimmungsschlüssel europäischer Flechten*. Ergänzungsheft I. J. Cramer eld., Vaduz, 258 + 4 p.




Fig. 4. — Asko 8-spora k askosupro J+ (blua) de *Mosigia gibbosa*.  
Asque avec 8 spores et sommet ascal I+ (bleu) de *Mosigia gibbosa*.